

Seminario pri la formiĝo de Eŭropo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 613/96-2, 1982 aŭgusto 26 kaj 28.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-96/SRI-1982-96-2-613-Claude-kaj-Andree-GACOND-Seminario-pri-la-formigho-de-Europo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La 26-an kaj 27-an de junio la ĉisomera kurssesio de la Internacia Feria Altlernejo (IFA) de Kultura Centro Esperantista (KCE) malfermiĝis per seminario dediĉita al la formiĝo de Eŭropo.

A.- Svislanalo troviĝas meze de Eŭropo, kaj estas do tute nature, ke Kultura Centro Esperantista sentis la bezonon dediĉi studan semajnfino al la atenta ekzameno de la kresko de la Eŭropa Komunumo, eĉ se la Helveta Konfederacio ne membriĝis en ĝi.

Cl.- Brita funkciulo ĉe la Ekenomia kaj Socia Komitato de la Eŭropa Komunumo en Bruselo, s-ro John Catling, estis la ĉefprelegisto en tiu ĉi seminario. Per filmo kaj per tre bone dokumentita raporto, li intimigis la partoprenantojn al la iom sekreta vivo de institucio, kiu tutcerte garantias pli kaj pli la pacan kunvivadon en okcidenta Eŭropo.

A.- Komparoj kun la formiĝo de la svisa federacio, kiu ankaŭ iom post iom kreskis, akceptante novajn ŝtato-membrojn kaj evoluante al pli kaj pli firma unuiĝo kun komunaj superkantonaj institucioj, komprenigis, ke ankaŭ la Eŭropa Komunumo estas la komenco de promesplena organismo, kies disvolviĝo jam kvaronjarcenta atestas la vivantecon.

Cl.- La gazetaro, radio kaj televido bedaŭrinde malofte raportas pri tiu ĉi disvolviĝo, kiu estas neniel dramoplena. Nur kiam maratonaj kunvenoj spegulas kelkajn malkonsentojn, artikoloj kaj elsendoj direktas la rigardojn de la publiko al Bruselo. Sed tiuj ĉi efemeraj raportoj neniam konkludiĝas per provoj ankaŭ raportoj pri la pozitivaj rezultoj de tiuj maratonaĵoj.

A.- Ni faros escepton. Dum kelkaj elsendoj, helpe de citaĵoj el dika seminaria raporto, kiun publikigis Kultura Centro Esperantista, ni rakontos al vi pri la disvolviĝo kaj aktiveco de la Eŭropa Komunumo. Se tiu ĉi temo estas por vi interesa, petu tra la kanalo de Svisa Radio Internacia tiun ĉi raporton de Kultura Centro Esperantista, kies aŭtoro estas John Catling.

Cl.- Hodiaŭ ni raportu pri la historia fono al la Eŭropa Komunumo.

A.- La unuiĝo de Eŭropo estas jam delonge revo de politikistoj kaj pensuloj el ĉiuj partoj de la Eŭropa kontinento. Ne necesas tie ĉi altrudi tro la nomojn de Karlomanjo aŭ de tiuj, kiuj perforte celis meti Eŭropon sub saman flagon - la flagon de konkeranta nacio.

Cl.- Sufiĉas diri, ke je la fino de la lasta mondmilito en 1945, jam voĉoj leviĝis favore al iu konfederacio de la ŝtatoj de Eŭropo.

A.- Unu el tiuj voĉoj estis tiu de Winston Churchill, kiu en 1948 okaze de parolado en Zürich pledis por eŭropa paciĝo sub komuna politiko.

Cl.- Sed la vera unua etapo en la historio de la Eŭropa Komunumo fariĝis je la 9-a de majo 1950, kiam Robert Schumann, franca ministro pri eksterlandaj aferoj, proponis kunmeti la karbo- kaj ŝtalo-produkton de Francio kaj de Federala Respubliko Germanio, sub tiel nomita Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo.

A.- La ideo ke ŝtato povus fardonaci parton de sia suvereneco al interŝtata organizo ankoraŭ tiam aspektis sufiĉe revolucia, sed laŭ Schumann karbo kaj ŝtalo estas la ŝlosilo al milito, kaj tial komuna agado helpus fortigi pacon inter la nacioj de Eŭropo.

Cl.- Dank' al la senĉesaj klopodoj de Robert Schumann kaj de ties kolego Jean Monnet, la fonda traktato de la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo subskribiĝis je la 18-a de aprilo 1951 en Parizo.

A.- Ses el la nacioj de Eŭropo deklaris sin pretaj kunlabori. Ili estas Belgio, Francio, Germanio okcidenta, Italio, Luksemburgio kaj Nederlando.

Cl.- La instancoj de la nova Komunumo jam entenis la prototipojn de la postaj instancoj de la Eŭropa Komunumo: oni provizis Konsilion de Ministroj por decidi, Altan Aŭtoritaton por administri, Kortumon por juĝi disputojn pri interpretado de la traktato kaj Parlamentan Asembleon por konsili.

A.- La nova Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo bone komenciĝis. Tamen aliaj provoj perfektigi la Komunuman celon en 1954 sub formo de Eŭropa Defenda Komunumo kaj Eŭropa Politika Komunumo, fiaskis pro rezisto en la 6 membro-ŝtatoj kaj tute malakceptiĝis.

Cl.- Sed la gradaj sukcesoj sur la kampo de karbo kaj ŝtalo incitis al pliaj provoj en la nivelo de ekonomia kunlaboro kaj en 1956 komenciĝis interparoloj pri doganaj tarifreduktoj kaj pri atomenergia, traktadoj kiuj finiĝis en 1957 je la subskribo de du novaj traktatoj en Romo fare de la samaj 6 membro-ŝtatoj; unu traktato por la tiel nomita ekonomia komunumo kaj unu por la atomenergia komunumo.

A.- Tiuj traktatoj kreis iom komplikajn situacion. Ekde tiam tekestis efektive tri komunumoj:

Cl.- Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo, laŭ la Traktato de Parizo,

A.- Eŭropa Ekonomia Komunumo, la Komuna Merkato, laŭ la Traktato de Romo.

Cl.- Kaj Eŭropa Atomenergia Komunumo, Eŭratomo, laŭ la Traktato de Romo.

A.- Ĉiuj tri Komunumoj kavis apartajn instancojn por decidofaro kaj administro, sed disponis pri la sama Kortumo por juĝi disputojn kaj pri la sama Parlamenta Asembleo.

Cl.- La sukceso de la Ekonomia Komunumo, kies bazaj celoj estis la forigo de dogantarifoj inter la membro-ŝtatoj kaj la establigo de komuna ekstera tarifo, estis preskaŭ neatendite granda. Sed je politika nivelo estiĝis problemoj, antaŭ ĉio kiam temis pri plilarĝigo de la povoj de la Komunumaj instancoj.

A.- La rifuzo de la plilarĝigo de la povoj de la Komunumaj instancoj en 1966 kaŭzis portempan krizon.

Cl.- Tamen en 1967 oni estis preta denove antaŭeniri kaj tiam oni kunfandis la triopajn instancojn en unu tuton. Tiel restis post 1967 nur unu Komisiono, unu Konsilio, kune kun unu Kortumo kaj unu Parlamenta Asembleo, kiu pli kaj pli nomis sin nur "Eŭropa Parlamento", kvankam ties membroj ne elektiĝis per rekta balotado sed nomiĝis de la membro-ŝtataj registaroj el inter la naciaj parlamentanoj.

A.- Kvankam restis la tri traktatoj, oni prefere ekde tiu ĉi momento parolis nur pri la "Eŭropa Komunumo" kaj ne plu pri la tri Komunumoj aŭ pri Komunumaro.

Cl.- La periodo 1968-1973 vidis plurajn klopodojn progresi sur la kampo de ekonomia kaj mona unuiĝo. Sed precize en tiu tempo la ripetaj provoj kunteni fiksajn kurzojn por la Membroŝtataj monvalutoj montriĝis vanaj pro la ĝeneralaj perturboj en la monda financa situacio. Krome ankaŭ ripete montriĝis, ke pro manko de politika kunlaboro la ekonomioj de la 6 membroŝtatoj multe diferencis.

A.- En 1973 tri aliaj ŝtatoj aliĝis al la Komunumo: Britio, Danlando kaj Irlando, sed ilia alveno bedaŭrinde koincidis kun la energi-krizo, kiu ĉie malstimulis ekonomian aktivecon kaj gvidis al industria stagno.

Cl.- Tamen en 1974 la ŝtatestroj de la Membroŝtatoj faris alian antaŭenpaŝon en tio, ke ili konsentis regule kunveni trifoje jare. Tiel formiĝis la Eŭropa Konsilio. Kaj ili akceptis la elekton de la Eŭropa Parlamento per rekta balotado ekde 1979.

A.- En tiu jaro 1979 ankaŭ fondiĝis la Eŭropa Mon-Sistemo per kiu oni esperas konverĝigi la ekonomian kaj monan politikojn.

Cl.- Kaj fine en 1981 Grekio aliĝis kiel deka membroŝtato de la Eŭropa Komunumo.

A.- Tiu ĉi disvolviĝo okazis en nura kvaronjarcento. Impresigaj pozitivaj rezultoj pacigaj.

Cl.- La venontan semajnon ni raportos pri la celoj de la Eŭropa Komunumo. Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!